Pastro Kanoniko Jos. Blackburn, kiu dum 40 jaroj laboris kiel misiisto inter la indianoj "Cree" (kri) kaj "Ojibway" (oĝib'uej) en Norda Ontario, Kanado, sendis al ni ekzempleron de la gazeto "The Beaver" ("La Kastoro"), eldonita de la Kompanio "Hudson's Bay". El ĝi ni ĉerpis la sekvantajn priskribojn kaj bildojn pri la antaŭaj kaj nuna vivo de la indianoj de Norda Ontario.



La indianoj nomataj "Swampy Cree" (marĉa 'Cree') havis en antaŭaj tempoj eble la plej malfacilan vivon el ĉiuj triboj en Nord-Ameriko. Ĝia teritorio estis lando de arbaro, rokoj, kaj marĉoj, kaj ne povis nutri grandan loĝantaron – nek homojn nek bestojn.

La indianoj devis gajni sian vivrimedon per fiŝkaptado kaj ĉasadado. Ili loĝis en tendoj konusformaj aŭ rondaj, kovritaj per la ŝelo de betularbo. Pli norde oni uzis la felon de la norda cervo "Caribou" (kar'ibu) por kovri la stangojn de la tendo. La indianoj kutime kunportis siajn tendojn kiam ili migris de loko al loko – vintre per toboganoj kaj neĝŝuoj, somere en kanotoj de betulŝelo.

La ŝelo de la arbo estis ankaŭ utiligata por fari diversspecajn ujojn, utiligeblajn kiel kuirpotojn. Ekzemple, por boligi akvon en tia ujo, oni enmetis varmegajn ŝtonojn, ĉar kompreneble la betulŝelo ne povis kontraŭstari fajron.

Por armiloj la indianoj uzis pafarkon kaj sagojn kun ŝtonpintoj, sed ŝajne plej utilaj estis lerte faritaj kaptiloj por kapti bestojn. El la felo de la norda cervo aŭ norda alko oni faris vestojn kaj kovrilojn. Ili lerte kunkudris peltojn de kunikloj por fari mantelojn kaj kapuĉojn.

La indianoj "Ojibway" tre similis en vivmaniero al la "Cree". Nuntempe, kompreneble, la maniero de la vivo preskaŭ tute ŝanĝiĝis. La tipaj peltŝuoj (mokasenoj) nun ne multe montriĝas, escepte nur kiam oni iras per neĝŝuoj. Ĉiu viro nun preferas porti pantalonon el blua serĝo. Hodiaŭ la indiano manĝas la panon de la blankulo, konservitan viandon, legomon kaj frukton, kolbasojn kaj makaronion – ĉiuj tre malsimilaj al la sekigita viando de antaŭaj tempoj. Ne plu oni vidas kanoton el betulŝelo. Hodiaŭ oni utiligas



kanoton kovritan per kanvaso, kaj plej ofte movigatan per motoro. Ne plu indiano vojaĝas per neĝŝuoj grandan distancon norden por ĉasi kaj havigi felojn. Anstataŭ tio, oni nun vojaĝas per aeroplano.

Estas neniam dubo, ke la indiano rapide alprenas la modon kaj vivmanieron de la blankulo. Ni ŝatus diri, ke li estas pro tio pli feliĉa. Sed ĉu vere? ... Sendube multaj el la maljunuloj rememoras kun sopiro kaj nostalgio la "malnovajn bonajn tagojn", jam delonge for, neniam resperteblajn.

ALDONAJ KOMENTOJ DE DORIS TAPPAN CONNOR


Eble interesos niajn legantojn mallonga raporto pri la sperto de misiisto rilate al la lingvo-problemo inter la indianoj "Cree". Kompreneble, la indianoj havis nenian alfabeto skribitan lingvon. Kiam la misiisto volis fari alfabeton por reprezenti skribe la sonojn de la lingvo, por ke li povu instrui al la indianoj la legadon – kaj pli grave la religiajn himnojn – li kreis alfabeton.



Unu someron, kiam mi estis en Nord-Dakoto, mi faris viziton al maljuna indiano, kiu longe laboris kiel instruisto inter sia popolo. Mi rimarkis en lia hejmo himnolibron en la lingvo "Cree". Tre surprizis min, ke inter la literoj de la farita alfabeto troviĝas supersignita litero Ŝ. Kiam la sinjoro prononcis tiun literon, ĝi sonis precize kiel nia Esperanta Ŝ. Mi demandis la sinjoron: "Kial la misiisto uzis tiun supersignitan literon – Ŝ?" Li respondis: "Nu, tiu litero reprezentas la sonon Ŝ, kiu estas multe uzata en la lingvo "Cree". Kiam la misiisto unue volis uzi

la digrafon SH por reprezenti tiun sonon, li trovis, ke la simpla indiana popolo insistis elparoli ĝin kiel du sonojn: S kaj H. Fine, kiam li metis simplan supersignon super la S – jene Ŝ – kaj diris, ke tiu litero reprezentas la sonon Ŝ, la indianoj tre facile lernis perfekte legi."

Al mi tiu sperto estas interesa kaj konvinka pruvo pri la utilo kaj taŭgeco de nia fonetika Esperanto-alfabeto kun supersignoj – unu litero por unu sono.



DE LA STELOJ ĜIS LA INFERO

Babilado pri Vortoriginoj en Esperanto

NI ĉiuj ofte uzas la vortojn *konsideri* kaj *deziri*, ĉu ne? Sed kiom el ni komprenas ilian originon? Ni ja scias, ke ili havas la saman signifon kiel similaj vortoj en angla kaj franca lingvoj. Eble ni ankaŭ scias, ke ili devenas de la latinaj vortoj *considerare* kaj *desiderare* (en la itala lingvo ili ankoraŭ havas tiujn formojn). Sed ĉu vi rekonas en tiuj vortoj la latinan radikon *sider* – (*sidus, sideris*), t. e. *stelo*? *Konsideri* estas "rigardi la stelojn por trovi solvon de iu problemo", *deziri* estas "peti ion de la steloj". Jen klarigo, kiu povas inspiri poeton – kaj kulturhistoriiston, ĉar la du vortoj rememorigas nin pri epoko, kiam la steloj ludis gravan rolon en la homa vivo.

La vortoj *stelo* kaj *astro* havas la saman originon. La latina *stella* unue estis *ster-la*, en kiu vi facile rekonas la anglan *star*. *Astronomio* kaj *astrologio* estas grekdevenaj vortoj. *Astero* estas stelforma floro, *asterio* stelforma marbesteto, *konstelacio* grupo da steloj – aŭ nomo de moderna aeroplano.

Inter la steloj la homojn ĉiam plej multe interesis la *suno*, la *luno* kaj la *planedoj*. En greka lingvo la suno estas *helios*. Tio klarigas la vortojn *belianto* ("sunfloro"), *beliumo* ("sungaso"), *helioŝtato* (optika instrumento por ekzameni sunradiojn).

Oriento kaj *okcidento* estas latindevenaj vortoj indikantaj la regionojn de la suno "leviĝanta" (*oriens*) kaj "malleviĝanta" (*occidens*). *Sudo* estas malnovgermana vorto samdevena kun *suno*. *Sudo* do estas "la suna flanko". Kelkaj etimologiistoj eĉ spekulis, ke la malnovgermana *sunth* (de kiu devenas la novgermana *Süd*, la angla *south* kaj la franca *sud*) estas parenca al la sanskrita *danta*, kiu naskis la latinan *dens* kaj la Esperanto-vorton *dento*. Eble *suno*, *sudo* kaj *dento* ĉiuj tri devenas de hindoeŭropa radiko *ed*, kiu signifas "manĝi" aŭ "mordi".

Kaj de kie venas la vorto *nordo*? Ĝi estas malnovgermana, sed ĝia antaŭhistorio estas tute mistera. Estas bone konate tamen, ke la *norvegoj* estas la enloĝantoj de la "norda vojo" kaj la *normandoj* la "nordaj viroj".

La *luno* donis nomon al la tago *lundo*. Ĝi estas tago de la *luno* aŭ de la diino *Luna*. La kvar sekvantaj tagoj de la semajno ankaŭ portas la nomojn de latinaj gedioj (kaj samnomaj planedoj): *mardo* estas la tago de *Mars*, *merkredo* de *Mercurius*, *ĵaŭdo* (*dies Jovis*) de *Jupiter*, *vendredo* de *Venus*. D-ro Zamenhof elektis la nomojn laŭ ilia franca formo. *Sabato* venas de la hebrea *ŝabat*, t. e. "ripozo". *Dimanĉo* (*dies Dominica*) estas "la tago de la Sinjoro".

Planedoj ricevis sian nomon de la grekoj, kiuj nomis ilin *planetes asteres*, t. e. "migrantaj steloj".

La vorto *luno* estas parenca al *lumo*. Aliflanke la vorto *monato* venas de la germana vorto por *luno* (Monat, Mond, manod), kiu estas parenca al la latina *mensis*, kaj ambaŭ venas de hindeŭropa radiko *mē*, kiu signifas "mezuri". La *luno* "mezuras" la tempon, kaj periodo tiel mezurata estas *monato*.

Grava stelo estas la polusa stelo. Ĝia nomo venas de la greka vorto *polos*, kiu signifas "ĉirkaŭturno" aŭ "akso". De la norda poluso al la

suda poluso iras akso, ĉirkaŭ kiu turniĝas la *ĉielo* (laŭ la antikva pensmanjero) aŭ la tero (laŭ la nuna scienco).

Ĉielo venas de la franca *ciel* kaj de la latina *caelum*, kaj ĉi tiu lasta estas derivita de la verbo *caelare*, kiu signifas "ĉizi" aŭ "skulpti". La *ĉielo* originale estis volbajo "ĉizita" aŭ "skulptita" el la universo.

Sur la volbajo de la ĉielo dekdu gravaj stelaroj (aŭ konstelacioj) formas la *zodiakon*, t. e. la "rondon de la bestoj". Tiun nomon enkondukis Aristotelo, ĉar en tiu tempo la rondo konsistis el nur ses stelaroj, kaj ĉiu el ili havis nomon de besto. Nun kelkaj havas aliajn nomojn. Ŝajnas, ke en la antikva Babilonio la Akadoj komencis nomi stelarojn laŭ bestoj. La Akadoj nomis la zodiakon "la sulko de la ĉielo" kaj diris, ke tiu "sulko" estas "plugita de la Ĉiela Virbovo". La Virbovo do estis la unua el la dekdu zodiakaj konstelacioj, kiu ricevis nomon ankoraŭ nun uzatan.



La ĉielo estas "super" la tero. Kio do estas "sub" la tero? Laŭ la konvinko de la antikvuloj kaj de la mezepoko, la *infero*. La latina vorto *inferus* signifas "tio, kio estas sube". En la *infero* loĝas la *diabloj*. La vorto estas greka (*diabolos*) kaj signifas "la kontraŭjetanto" aŭ "la mensogulo". Lia nomo ankaŭ estas *satano*. Ĉi tiu hebrea vorto signifas "la kontraŭulo".

Eble ĉi tie oni povas atentigi pri kuriozaĵo en la Esperanto-movado. Kiam la franca revoluciulo Eugène Adam volis fondi klasbatalan Esperanto-asocieton, li nomis sin mem *Lanti* ("L'anti"), t. e. "la kontraŭulo" kaj la anojn de sia asocio "satanoj", t. e. ankaŭ "la kontraŭuloj". El la vorto *satano* li elŝeligis la vorton SAT kaj eltrovis por ĝi la titolon *Senacieca Asocio Tutmonda*. Ĉi tiu titolo estas tiel stranga kaj ĉiurilate neoportuna, ke oni tute ne povas kompreni la elekton de tia nomo sen atento pri la stranga amo de "Lanti" al la vorto "satano".

Sed ni reiru al la *infero*. Ĝi havas ankaŭ hebrean nomon, *Gebena*, kiu naskis la modernan Esperanto-vorton *ĝeno*. Se tio vin interesas, vi povas relegi detalojn pri la etimologia evoluo de tiu vorto en la artikolo "Ĝeno kaj Silko" en *Amerika Esperantisto* de Majo-Junio 1949.

Fine ni resupreniru al la *steloj*. Inter la steloj troviĝas la kvinpinta stelo de *Esperanto*. Neniu inter niaj legantoj bezonas klarigon pri la deveno de la vorto *Esperanto*. D-ro Zamenhof ja nomis sin "esperanto", "homo, kiu esperas". *Esperi* venas de la samsenca latina vorto *sperare* (la substantivo estas *spes*, "la espero"). Sed de kie venas tiu latina vorto? Eble ĝi estas parenca al la greka *speirein*, kiu signifas "semi", eble al la latina *spirare*, t. e. "spiri", de kiu devenas la Esperanto-vortoj *spiri*, *inspiri*, kaj *spirito*. Ekzistas latina proverbo *Dum spiro, spero*, "Tiel longe, kiel mi spiras, mi esperas". Jen bona devizo, eĉ se la etimologia rilato estas duba.

— W. S.

ESPERANTO - KRONIKO

Gustav kaj Miriam Carlson, Vancouver, Kanado, konstante helpas la propagandon de Esperanto jaron post jaro. Ili instruas kurson, disdonas propagandilon "PGL", skribas leterojn al la redaktoroj, kaj ofte havas okazon gastigi fremdajn Esperantistojn. Senŝanceliĝe ili daŭrigas la ofrolaboron por Esperanto, kaj subtenas la oficialan movadon. Tio estas laŭdinda aktiveco fare de samideano, sed en la kazo de Gesinjoroj Carlson, tio estas duoble laŭdinda pro tio, ke ili ambaŭ, kiel ĝoja paro kunlaboras por la Esperanto-ideo. Ni admire salutas!

"Universala" en Boulogne-sur-Mer, 1955? La urbestro de tiu franca urbo, kongres-loko de la unua Universala Kongreso de Esperanto 1905, sendis al ni leteron en kampanjo por nomi la urbon kiel kongres-lokon por celebri la Jubileon de la Unua Kongreso, t. e. en 1955. La propono sendube elvokos fervoran simpatian inter Esperantistoj tra la mondo.

John F. Schilke, juna studento en "Union School", Unionville, Conn., faris bonegan progreson en la lernado de Esperanto dum la pasintaj monatoj, kaj nun jam organizis kaj instruas kurson de kunstudantoj en sia lernejo. Li mirinde sukcesis varbi 35 studentojn por la kurso. Kaj li aplikas diversajn helpilojn en la instruado, ekzemple la libron "Esperanto The World Interlanguage", gramofonon, kaj maŝinon por kapti kaj disaŭdigi la voĉon. La du plej gravaj tagĵurnaloj de lia regiono presis informojn pri la nova kurso, nome "The Hartford Courant" kaj "The Hartford Times". Laŭdinda ekzemplo por Esperanto-junuloj en aliaj lernejoj.

Elwood R. Etter, R. R. 1, Bradford, Ohio, jam oferis sian tempon kaj presilon por helpi la 43-an EANA-Kongreson en 1953, same kiel li donacis dum kelkaj pasintaj jaroj. Al *S-ro Etter* ni ŝuldas la dankojn pro la bonegaj Kongreso-Kartoj kaj Kongreso-Kovertoj, kaj okaze ankaŭ glumarcoj por la EANA-Kongreso. Li estas fervora kolektanto de kovertoj por la unua tago de noveldonitaj poŝtmarkoj, kaj li interŝanĝas ilin kun multaj landoj. Li mem presas la devizojn sur kovertojn -- *kaj en Esperanto*. Li elstaras kiel propagandisto por Esperanto tiurilate. Li jam presis pli ol 20 kovertojn (cachets) dum 1952 kaj 1953. Jen la bela listo de poŝtmarkoj por kiuj li presis Esperanto-devizojn: 200-a Datreveno de "Betsy Ross"; 50-a Datreveno de Klubo "4-H"; 125-a Datreveno de Fervojo Baltimore kaj Ohio; 50-a Datreveno de Amerika Aŭtomobila Asocio; 80-cenda Aer-Poŝtmarko; Honoro al "NATO"; Digo "Grand Coulee"; 175-a Datreveno de "Lafayette"; Monumento "Mount Rushmore"; 100-a Datreveno de Civilaj Inĝenieroj; Virinoj en la Militistaro; Ĵurnal-liverantaj Knaboj de Ameriko; 500-a Datreveno de Gutenberga Biblio; Internacia Ruĝa Kruco; Ĉarto de U. N.; Homaj Rajtoj (2); Nacia Gvardio; Ŝtatiĝo de Ohio; Teritorio de Vaŝingtono. Ni gratulas kaj dankas.

D. A. Johnson en Alasko, konstante faras propagandon dum li servas en la armeo en tiu norda teritorio. Kondiĉoj ne estas favoraj, sed li faras laŭeble. La movado ŝuldas multon al 'esploristoj' por nia afero en tre foraj lokoj. Ofte rezultoj ne tuj vidiĝas, sed sindonemaj penoj kiel tiuj fare de Samideano Johnson plantas la semojn por posta rikolto. Jam iom da progreso montriĝas pro lia Esperanto-laboro.

ESPERANTO - KRONIKO

En la ŝtatoj Maine kaj Connecticut, S-roj Tom Robbins kaj Richard Johnson aktive laboras por informi la publikon pri Esperanto. S-ro Johnson, antaŭa lernanto de S-ro Robbins, organizas Esperanto-studrondon.

Ateston pri Kapableco, oficiala diplomo de EANA, ricevis lastatempe S-ro Henri Soudée, Washington, D. C.

En Toronto, S-ro J. W. M. Jenkins gvidas novan kurseton de Esperanto por komencantoj. Sub aŭspicio de la Toronto-Klubo, la kurso okazas dum la ĉiumonata kunveno de la grupo.

S-ro J. H. Schackmann, el Cincinnati, Ohio, faris en Marto viziton al la Centra Oficejo de EANA.

D-ro George A. Maggio ja havas kapon! En la pasinta numero de AE, kiam ni presis bildon pri la kurso de D-ro Maggio en la Telefon-Kompanio "Bell", bedaŭrinde pro eraro de la bindisto, estis fortranĉita lia kapo. Ni ĝojas, ke ni povas nun montri, ke li havas belaspektan bonan kapon, kiu inteligente direktas liajn multajn farojn por Esperanto. D-ro Maggio unue interesiĝis pri Esperanto antaŭ 7 jaroj. En 1951 li ricevis Ateston pri Kapableco kun rajto de instruado kaj aliĝis kiel membro-fondinto al la Esperanto-Societo en Newark. Depost tiu tempo li regule instruis kursojn kaj venontaŭtune li anticipas havi kurson por geinstruistoj de alternejoj en Newark.



Pastro W. J. H. Knappe sendis jenan interesan noteton: "Mi nun studas pri la Egiptoj de la jaro 1800 antaŭ Kristo, kaj rimarkas, ke la faraonoj insistis, ke la mondlingvo estu la tiama Egipta lingvo!"

Memoraĵon pri la unua kongreso de EANA ni ricevis de malnova Esperantisto Russell Johnston. Li sendis historian flugfolion pri "La Unua Esperanto-Kongreso en Ameriko ĉe Chautauqua, N. Y., 20-25 Julio 1908". S-ro Johnston skribis: "Kiel vi sendube scias, F-ino Ivy Kellerman tie renkontis S-ron Reed. (Poste ili geedziĝis.) Ŝi estis tre bela junulino. Tiutempe mi estis tre juna, sed mi povis tamen klare vidi ŝian belecon!"

La Jarlibro de UEA (Universala Esperanto-Asocio) aperis frue en ĉi tiu jaro. Ĝi estas bela 272-paĝa volumo kun interesa kaj utila enhavo, ĉefe la listo de delegitoj en 64 landoj. Ĉar EANA estas landa asocio aliĝinta al UEA, ĉiu membro de EANA rajtas uzi la servojn de la delegitoj. Sed por ricevi la Jarlibron, oni devas esti "individua" membro de UEA. Sendu \$1.25 al EANA, kaj vi ricevos ĉi tiun jarlibron kaj ankaŭ malpli grandan duan parton, kiu aperos en la aŭtuno.

Ni bedaŭras raportoj pri la forpaso de Samideano Charles H. Briggs, pioniro de Esperanto, kiu mortis la 8-an de Aprilo. Dum pli ol 45 jaroj S-ro Briggs aktive laboris por Esperanto, instruante kursojn en Minneapolis kaj St. Paul, Minnesota, kaj Long Beach, California, skribante artikolojn, tradukante, kaj kiel sciencisto partoprenante en tutmonda korespondado.



DEZIRAS KORESPONDI

Kosto de anonco: Eksterlande, unu vorto aŭ mallongigo por unu cendo (ses vortoj por 1 int. respondukupon); Enlande, unu vorto por du cendoj.

- Brazilo.** J. C. Machado, Caixa Postal 68, *Tupaciguara* (Minas Gerais). Deziras korespondi kun la tuta mondo.
- Japanujo.** Kijoŝi Huruja, Misaki-Suikoo, Aburacubo, *Misaki-maĉi*, Kanaĝaŭa-ken. 24-j. dez. kor. pri diversaj temoj kun Nord-Amerikaj gestudentoj kaj junaj, sinceraj samideanoj.
- Japanujo.** Esperanto-Rondo de Hita Jyonai Kolegio, Kami Jyonai-machi, *Hita-sbi*, Oita-ken. 13 junulinoj kaj 5 junuloj deziras korespondi.
- Usono.** John F. Schilke, Sunset Terrace, *Unionville*, Conn. Deziras korespondi pri astronomio.
- Usono.** W. Udo Segert, 305 East 75 St., *New York 21*, N. Y. Deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj. Certe respondos kaj sendaĵojn afrankos per UN-poŝtmarkoj.
- Argentino.** Lino Signoratos, *San Luis 150, Mendoza*. Deziras korespondi.

10% Discount on All Books to Members of EANA

Along with the Jan-Feb issue of AE you received the complete catalog of the *Esperanto Book Service of America*, official book service of EANA. The Central Office is pleased to announce that henceforth all members of EANA will enjoy 10% discount on ALL books and other items in the catalog purchased from Headquarters. Thus, when you order books in any amount just take 10% off the total sum due. Now is a good time to order those books you may be wanting. This offer of 10% discount will be valid until new catalog is issued, or until further notice. Take advantage of this special privilege to Members of EANA.

EANA & UEA MEMBERSHIP DUES FOR 1953

The Association thanks you sincerely for your support during 1952 and requests that you send your 1953 dues soon. An early remittance would be very helpful and would avoid the extra office work of sending out reminders.

All categories of EANA membership receive the *American Esperanto Magazine* and all *Bulletins*. Your EANA membership automatically gives you "Associate Membership" (AM) in the UEA. You receive the coupons of the UEA and have a right to the services of Delegates throughout the world.

In addition, there are "Individual Membership" categories in UEA: the *Yearbook* is supplied for an additional \$1.25 annually; the *Yearbook* and the magazine *Esperanto* (monthly) are supplied for an additional \$3.00 annually. Here are Membership Rates for 1953:

EANA membership including UEA	Associate of UEA	Yearbook of UEA	Yearbook & Esperanto
Regular Active Member	\$5.00	\$6.25	\$8.00
Patron Member	10.00	11.25	13.00

POPULAR ESPERANTO BOOKS

The Central Office is equipped to supply all your book needs. Here are a few popular and standard items. 10% discount in quantity. Ask about other titles.

<i>PRACTICAL ESPERANTO</i> , Dr. Wm. Benson. Many use this text for class or self because it is unique with 650 pictures to illustrate rules, affixes, vocabulary, etc. Grammar in English, exercises in Esperanto. 160 pp. illustrated.....	\$.25
<i>REED'S PRACTICAL GRAMMAR</i> , Dr. Ivy K. Reed. A very complete beginner's text for class or self, with extensive examples, dialog, etc. Offset reprint, a few pages slightly blurred but fully usable. 142 pp. with vocabularies and a complete index. Original price 75¢, reduced to less than half-price.....	.35
<i>ESPERANTO: THE WORLD INTERLANGUAGE</i> , Connor-Solzbacher-Kao. The new complete manual of Esperanto. "6-books-in-1": history, textbook, reader, world directory, 2 dictionaries. All in one vol. 245 pp.....	Paper \$1.50; Cloth 3.00
<i>UNIVERSALA ESPERANTO-METODO</i> , Dr. Benson. Encyclopedic all-Esperanto book of 11,000 pictures with textbook, reader, dictionary. 560 pp.....	Cloth 6.00
<i>ESPERANTO GRAMMAR & COMMENTARY</i> , Cox. A detailed and thorough analysis of Esperanto grammar in English, innumerable examples. 371 pp.....	Cloth 1.50
<i>ESPERANTO (World Language Series)</i> , Prof. Mario A. Pei. Complete Esperanto chapter from "World's Chief Languages". Gram. survey, vocabularies, etc.....	.25
<i>WORLD'S CHIEF LANGUAGES</i> , Prof. Mario A. Pei. A guide and survey of languages of entire world, incl. Esperanto. Maps, glossary, index. 663 pp....	Cloth 6.00
<i>AMERICAN POCKET DICTIONARY</i> , Karl Froding. Esp-Eng & Eng-Esp. Beginner's pocket companion. Offset edition in paper covers. 80 pp.....	.25
<i>EDINBURGH DICTIONARY</i> . Esp-Eng & Eng-Esp. Excellent and complete, in concise form. The very best small dictionary for English speakers. 288 pp....	Cloth .85
<i>MILLIDGE ESPERANTO-ENGLISH DICTIONARY</i> . Latest edition with 2nd, 3rd, 4th, 5th, & 6th "Aldonoj de la Lingva Komitato". Complete, 490 pp.....	Cloth 2.50
<i>FULCHER & LONG ENGLISH-ESPERANTO DICTIONARY</i> . Incl. proper names and neologisms. Each meaning listed separately. Complete, 348 pp.....	Cloth 2.35
<i>PLENA VORTARO DE ESPERANTO</i> , Grosjean-Maupin. Esp-Esp. The large complete all-Esperanto dictionary. Authoritative. 511 pp. Offset edition.....	Cloth 4.00
<i>Rare</i> , exactly same as above, but better paper & binding. Deluxe ed.....	Cloth 6.50
<i>FUNDAMENTA KRESTOMATIO</i> , Zamenhof & others. Authoritative chrestomathy and literary guide. Innumerable model stories, poems, etc. 472 pp.....	Paper 1.65
Latest edition, exactly same as above, but newly bound in boards....	Half-Cloth 2.50
<i>KARLO</i> , Edmond Privat. Very popular easy first-reader, used in many classes. Life of Karlo as he grew from boyhood to young manhood and marriage. 43 pp...	.25
<i>THE BIBLE in Esperanto (Sankta Biblio)</i> . The best "Reader". Beautifully printed. Bound in blue, art vellum, 8vo, latest ed. on excel. Bible paper. 996 pp....	Cloth 2.50
<i>ESPERANTO SORTIMENTO</i> . Five books, good reading at low cost: <i>Akrobato de Nia Sinjorino</i> , legend of France, 25 pp; <i>Blanche-Virgulino de Lille</i> , medieval romance, 42 pp; <i>Lando de Argenta Akvo</i> , story of Far West, 48 pp; <i>Miserere</i> , music story, & <i>Tbais</i> , by Anatole France (2 bks in 1), 66 pp; <i>Rozujo Ciumiljara</i> , the miracle of love, 48 pp. Each book 25¢. Entire sortimento for only.....	1.00
<i>RARE COLLECTION OF 25 ESPERANTO KEYS</i> . Albana, Angla, Araba, Baska, Ĉeĥa, Dana, Estona, Finna, Flandra, Franca, Germana, Hispana, Hungara, Islanda, Itala, Japana, Malaja, Norvega, Persa, Portugala, Romanĉa, Rusa, Slovaka, Sudafrika, Sveda. Contains several rare items. Most complete collection...	2.75
<i>INDIAN BEAD STAR</i> . Genuine "Kiowa" work, tiny Indian beads on fine buckskin, round white ground with green star, beautiful rare art piece, 1 1/4" dia., brooch..	1.00
<i>GREEN STAR PENDANT</i> . Round white ground with green star on both sides of pendant, nickel trim, eyelet & 1 link, for necklace or watch-chain, 1 1/16" dia....	.75
<i>ENAMEL GREEN STAR</i> . Round white ground, gold trim, 7/16", button or brooch..	.65
On pentagonal white ground, with an E, gold trim, 7/16" dia., button or brooch...	.65
On star-shaped ground, with E, white edge, gold trim, 10/16", button or brooch....	.65
On round white ground, gold trim, 1/4" dia. (small), with 2" pin, tie-pin only.....	.65

Esperanto, 114 W.16 St., New York 11, N.Y.

NEW CONNOR COURSE IN ESPERANTO

Correspondence Course with Vinylite Records
Instruction by Doris Tappan Connor

New! Modern! The "*Connor Course*" is unique, — it provides real-life disk conversations plus the personal instruction of *Doris Tappan Connor*. The one and only record course, in any language, that gives *everything* in the way of learning aids. *NOW*, you can learn Esperanto like a "native"— *better, quicker, and easier*. It's fun to learn this real-life way! You *converse* with the disk and *confer* with the instructor. The "*Connor Course*" is compiled by experts. "*Vinylite*" recordings by Mr. and Mrs. Connor. All designed so you can *master* Esperanto.



The complete "*Connor Course*" includes the following:

- (1) A lively text, "*Esperanto: The World Interlanguage.*"
- (2) Eight complete "*Vinylite*" double-sided 10" records.
- (3) A practical and easy-to-follow "*Study Guide*" (82 pp.)
- (4) Personalized instruction and guidance of *Mrs. Connor*.
- (5) Supply of answer paper and printed return envelopes.
- (6) An interesting card game, to develop your vocabulary.
- (7) And finally, an official "*Certificate of Achievement*".

FOR INDIVIDUAL STUDY: The complete "*Connor Course*", as described above, will be sent postpaid for only \$36.

FOR GROUP STUDY: Buy one complete *master course* at \$36. Each additional member pays only \$6 more for Textbook and complete Study Guide for his own use.

Full money-back guarantee. So, place your order **NOW**:

Esperanto, 114 W. 16th St., New York 11, N. Y.